

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 10 fkoj
Bonfara : 15 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

MARTO - APRILO

1972 2

KULTURAJ KAJEROJ

1972 MARTO - APRILO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Mire pompaj juvelŝtonoj

Vojaĝo al Marso

La Unuaj Jaroj de la Esperantista Kulturdomo M. De Waard

Gabriela Mistral (fino) trad. E. Motillon

Fabelo pri fiŝisto kaj fiŝo A. Puŝkin

Kiam historio kaj legendo intermiksiĝas B. Cheverry

Nia Konkurso P. Chevalier

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

El Grésillon

La Ĝenerala Kunveno de E.K.D. okazinta la 19-an de marto konstatis la novajn plibonigojn de la kastelo kaj la regule kreskantan nombron da vizitantoj. Jam ĉijare novaj ĉambroj estas modernigataj.

La jaro 1972 anonciĝas bona. Kiam mi skribas tiujn liniojn, la Paska Kultura Semajno organizita de J.E.F.O. okazas kun 80 partoprenantoj el kiuj kvindeko da gejunuloj. Por la somero multaj ĉambroj estas jam rezervitaj. Estus bone, ke la interesatoj, kiel eble plej frue aliĝu ĉar, verŝajne, komence de junio ne multe da ĉambroj estos ankoraŭ liberaj.

Jen denove la programo de ĉiu periodo : Komence de julio (2-23) kursoj por komencantoj kaj progresantoj, supera kurso, kaj se kandidatoj prezentiĝos, kurso pri pedagogio okazos, gvidataj de S-roj J. Thierry, P. Babin kaj D. Babin. Samtempe grupeto da infanoj ricevos specialan instruon adaptitan al ilia aĝo. La dua periodo estos dediĉita al « dudek jaroj da poresperanta aktiveco » ; pluraj organizoj internaciaj konsentis sendi reprezentanton por paroli pri sia propra agado. Multaj ekterlandaj gesamideanoj jam aliĝis al tiu periodo certe tre interesa. La tria periodo multe similos la unuan. Tri kursoj okazos sub gvidado de S-roj Le Magadure kaj Ribot, kaj F-ino Le Magadure. Al la kutimaj flankaj aktivaĵoj (bindado de libroj, korbofarado, emajlado), aldoniĝos speciala kurso pri foto-arto gvidata de S-ro Leriche. Dum la kvara periodo okazos kursoj. Sed ŝajnas, ke pluraj personoj venos ankaŭ por ripozi antaŭ ol reveni al sia laboro.

Aliĝu tuj. Dum ankoraŭ kelkaj semajnoj vi povos ricevi la deziratan loĝadon.

NE PLU ATENDU

Pagu vian abonon tuj.

Helpu nin per abonigo de viaj geamikoj aŭ gekorespondantoj. Ju pli kreskos la nombro de abonantoj, des pli kreskos la kultura valoro de la revuo... kaj via plezuro.

(Vidu adresojn de perantoj sur la lasta kovril-paĝo).

Por Francio : **P. BABIN,** 13, bd la Chauvinière — 44 - NANTES

Poŝtkonto : NANTES : 2 813 61

Esperanto tra la Mondo ★

POR LA FRANCLINGVAJ LANDOJ : ESPERANTA LERNLIBRETO EN LA POPULARA SERIO « MARABOUT-FLASH »

Post plurjaraj klopodoj la eldonejo de la fama populara serio « Marabout-Flash » vendita kaj prezentita en ĉiuj librovendejoj de Francujo akceptis eldoni la libreton « Je parle Esperanto » de S-ro Jean Thierry.

Tio estas grava sukceso por nia movado kaj ĉiuj franclingvaj esperantistoj devas sin konsideri kiel mobilizitaj por certigi kaj pligrandigi la efikon de tiu atingajo, anoncante la aperon de tiu lernlibreto, sendante ĝin al eminentuloj aŭ edukistoj, organizante gazetarajn konferencojn kun prezentado ankaŭ de aliaj esperanto-libroj (ĝuste, 1972 estas la « Jaro de la libro » proklamita de U.N.E.S.C.O.).

« SUPLEMENTO » AL NIA SOMERA KALENDARO

— **12-19a de Aŭgusto :** « Eŭropa esperanto-konferenco », kun varia kaj interesa programo, en Zagrebo. Poste, laŭvole, septaga ferio-restado en la fama esperanto-somerujo de Primoŝten, ĉe Adriatiko (20-26a de Aŭgusto). Informoj : Internacia Kultura Servo 41000 Zagreb, Amruševa 5/1, Jugoslavio.

— **17-23a de Julio :** Konferenco de Internacia Ligo de esperantistaj edukistoj, en la kadro de la jam anoncita Hungara Kulturfestivalo de Budapeŝto.

— La komisiono por eksteraj rilatoj de la junulara Esperanto-Movado (T.E.J.O.) aranĝos seminarion « Lingvo kaj politiko » en Parizo, inter la 10a kaj la 16a de Julio, ankaŭ por ne esperantistoj. Tri lingvoj uzotaj : esperanta, angla, franca lingvoj. Adresoj : ĝenerala kunordigado T.E.J.O.-K.E.R., Binnenkant 46, Amsterdam 1001, Nederlando. Aliĝoj : J.E.F.O., 34, rue de Chabrol, Paris (10), Francio. Kulturaj kaj programaj aferoj : F-ino Claude Nourmond, 8, rue des Frères-Lumière, F-77 Melun, Francio.

FAKA ASOCIO POR BIBLIOTEKISTOJ...

Ĉiuj esperantlingvaj laborantoj en bibliotekoj povas rilati kun S-ro P.J. Lareau, 1032, Orchard Str., Toledo, OH 43609, Usono, kiu respondecas pri la nova Internacia Esperanto-Asocio de Bibliotekistoj.

... POR LA MARISTOJ KAJ HAVENLABORISTOJ...

La interesatoj povas aliĝi al Mara Esperanto-Rondo Internacia, skribante al S-ro Kees Ruig, Thomas a Kempislaan 24, Amstelveen, Nederlando.

Por la abonantoj de la bonega revuo « Homo kaj Kosmo » (Kiu publikigas la informojn de M.E.R.I.), la aliĝo estas senkosta.

... KAJ POR LA POŜTISTOJ

Ĉu vi konas Internacian Poŝtistan kaj Telekomunikistan Esperanto-Asocion ? Skribi por aliĝo (9 Francaj Frankoj jare) al S-ro Roger Colney, directeur des P.T.T., F-05 Gap, Francio.

TRIJARA EKSPERIMENTO EN KVIN LANDOJ

En la nuna lerneja jaro, komenciĝis trijara eksperimento de koordinata instruado de Esperanto en 34 lernejoj elementaj kaj mezgradaj de kvin najbaraj landoj : Jugoslavio, Italio, Aŭstrujo, Bulgario, kaj Hungario.

Post trijara studado, en 1974, la plej bonaj lernantoj estos invitataj al kunveno en kiu partoprenos lernejaj aŭtoritatoj kaj reprezentantoj de internaciaj kulturaj organizoj.

La kursoj konsistas el 2-3 instruhoroj semajne kun la lernolibro de Prof. I. Szerdahelyi, de Budapeŝto.

AKTIVADO DE LA JUNAJ ESPERANTISTOJ EN SOVET-UNIO

Soveta Esperantista Junulara Movado aranĝas ĉiujare renkontojn kiuj altiras proksimume 250 aŭ 350 partoprenantojn. Funkcias minimume 43 junularaj kluboj.

Dum Februaro, okazis ekzemple renkontiĝo de Ukrana esperantista junularo kun cento da gejunuloj, kun aprobo de oficialaj organizajoj.

Se vi deziras skribi al junaj sovetaj geamikoj, turnu vin al V. Silas, Dakanto 8-9, Vilnius, Litova S.S.R., Sovet-Unio.

EN NORDA VJETNAMO...

Depost 1956, pluraj lernolibroj kaj vortaroj aperis en Norda Vjetnamo. Dum la 15 pasintaj jaroj, Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio (68, Ly Thuong Kiêt, Hanojo), sukcesis esperantigi pli ol dumil kvincent personojn kiuj ricevis la ateston pri lernado (sepcent el ili ricevis la ateston pri duagrada kapableco).

La fremdlingva eldonejo eldonis jam plurajn librojn en Esperanto.

KAJ EN SUDA VJETNAMO

Profesoro de franca lingvo en Universitato de Sajgono, S-ro Francisko Simonnet (franco) aktive partoprenas la agadon por Esperanto kaj la aranĝon de kurso en la urbo.

LITERATURA GAZETO ELDONITA EN ITALUJO

Nova literatura gazeto dumonata aperas nun en Italujo. Temas pri « Literatura Foiro ». Petu specimenon al la redaktejo : Via Pantano 17, 20122 Milano. Jara abono : 1.000 liroj.

LA AFIŜO DE U.E.A. EN NOVA FORMATO

La modernstila afiŝo de U.E.A., kun blanka loko por anonco de kursoj, manifestacioj, aperas nun en la tre oportuna formato 42 x 30 cm., por montrofenestroj, anonctabeloj, ktp...

NIAJ LIBROJ

— « Cigana romancero » de Frederico Garcia Lorca, tradukita de Frenando de Diego. Unu el la plej grandaj poetoj nun havebla en Esperanto ! Eldono de « Stafeto ».

— « Invit'al Japonesko », poemkolekto originala de Miyamoto Masao.

— « Neĝa lando », de la Nobel-premiito Kawabata Yasunari, tradukita de Komisi Gaku.

— « Serĉado de la Vivo » de Fujio Egami (traduko). Populara scienca libro pri biokemio.

— « Tra lando de Indianoj » de Tibor Sekelj (ekspedicioj en Matogroso).

MIRE POMPAJ JUVELŜTONOJ

Historio de fajrera diamanto, purpura rubeno, markolora safiro, verda smeraldo perdiĝas en la nokto de la pratempoj. Naskiĝintaj de la lumo, ili fascinis la ĉiutempajn homojn, kiuj atribuis al ili potencon sur vivo kaj morto. Pro ilia dureco, pro ilia nedifektebleco, en nia mondo, kie ĉio, kaj homo pli ol ĉio, formalaperas, oni ilin ligis al la senmortaj dioj kaj oni ilin inkrustis en la diaj ŝtonaj statuoj. Pli poste la reĝoj proprigis al si tiujn mirindaĵojn simbolajn je eterneco. Ĉar la Tero ilin liveras nur tre rare, ili ĉiam estis alte ŝatataj... kaj tre multekostaj.

Tiu malofteco naskigis revojn, gvidis la paŝojn de la prifosantoj, elvokas tutajn vivojn dediĉitajn al ilia malkovro, la sangon elverŝitan pro ili kaj la krimojn faritajn je ilia nomo.

« La Granda Mogolo » — « La Granda Orlov »

Li, post multtaga gvatado, post multnokta maldormado, finfine sekrete eniras en la templon ; en la bruetanta obskureco, lia revo de mil febraj noktoj realiĝas. Antaŭ li, la Idolo ege grandas ; ĝi lin premas, ĝi lin premegas ; ĉu li kuraĝos marŝi al ĝi ? alkroĉiĝi al ĝia glata ŝtono ? atingi la sanktan kapon ? ĉu li kuraĝos meti sur ĝin siajn manojn ?

La ĉizilo, kiun li plej zorge elektis, longe akrigis, glitas sur la ridetanta vizaĝo. Li tremas ; la minutoj, eble tuta horo, daŭras kvazaŭ eterneco. Fine la okulo defalas el la okul-kavo ; li sentas ĝian glacian pezon ; li fermas siajn fingrojn sur ĝi ; ... li glitas laŭlonge de la senmova statuo. Li forfuĝas...

Longe, longe li marŝas (li memoras : same longe li marŝis, kiam li estis grenadisto en la armeo de generalo Dupleix ; sed tiam li ĝoje marŝis .... ĝoje...).

Hodiaŭ, la diamanto, dika kiel duon-ovo, kaŝita ĉe lia zono, pezas pli ol unu tuno. Inter du febraj dormoj, inter du lacigegaj etapoj, dum kiuj ŝajnas al li, ke la soldatoj de la Granda Mogolo galope postkuras lin, la eksa soldato de la Hinda Armeo kontemplas sian luksegan ŝtelon. En la verda lumo de la densa hinda arbaro la enorma diamanto flamegas kiel verda suno.

Finfine estas marŝo al la maro. Haluciniga timo, senutila fuĝo ! Ne la soldatoj de Granda Mogolo lin kaptas... sed la Pesto. Tamen, antaŭ ol morti, la sakrilegia ŝtelisto cedas por 10 000 eskudoj la miregan ŝtonon al Anglo. Tiu ĉi ĝin vendas por 50 000 eskudoj al Siriano, kiu ĝin revendas al armenia juvelisto por 500 000 eskudoj.

Tie ĉi ĝin malkovras Gregory Orlov. Li estis amita de la Granda Katarina ; sed antaŭ 9 jaroj li estis forpuŝita de ŝi. Kaj, jen li ĵus ricevis de ŝi mallongan bileton : « Venu ! »...

Li venas, li trairas, kiel antaŭe, la oritajn salonojn de Kremlin ; li eniras la imperian ĉambron, alproksimiĝas al la lito, sur kiu Katarina ripozas ; li donacas al ŝi la fantastan ŝtonon : « Jen, ĝia nomo estas « La Granda Mogolo » Katarina, pardoneme ridetas : « De nun ĝia nomo estos : « La Granda Orlov ».

Estas la dua bapto de la plej bela el la verdaj diamantoj : kruda ĝi pezis 300 karatojn, tajlita 199,60 karatojn.

Oni inkrustis ĝin ĉe la duobla aglo de la Imperia Sceptro de Ĉiuj Rusujoj : oni povas ĝin admiri en la Trezorejo de U.R.S.S.

La Regento

En Titna, ĉiuvespere, la soldatoj de Granda Mogolo priserĉas la ministojn. La Granda Mogolo, la Princo de la Princoj, en sia malestimanta saĝeco, fordonas al la ministoj, por kontentigi ilian avidecon, la etetajn gemojn rigarditajn kiel ne indaj por la reĝa trezoro. La aliaj gemoj, ĉiuj aliaj, devas nepre esti donitaj al la gardistoj, kiuj senĉese kaj senhalte marŝas kaj viglas en la minejo...

.....Sed antaŭ enorma lumo-guto, kiu rulas sub lia piedo, la sklavo subite vekiĝas el dormo, kiu paralizis, antaŭ li, generacioj da sklavoj laborantaj en la minejoj. Li kaŝas la ŝtonon en anfrakton de la blua roko. Li atendas la nokton por pripensi. Preni ĝin, elporti ĝin el la minejo, forfuĝi .... jen la ŝlosilo por atingi Liberon kaj Feliĉon !

7 tagoj, 7 noktoj (7, kiel en legendoj) estis necesaj por starigi la ruzon, kiu donos al li pli ol la vivon. Propravole li tranĉas la karnon de sia gambo, bandaĝas la vundon kaj ĉiutage, lamante eniras en la minejon. Trifoje, kvarfoje la gardistoj disvolas la sang-makulitan bandaĝon.... kaj ne plu ĝin atentas ; ili alkutimiĝis al tiu lamulo, kiu kuraĝe venas por labori. La sepan vesperon denove la sklavo malfermas sian vundon, kiu jam cikatriĝas, enigas la gemon, pli helan ol akvo, en tiun vivantan juvelujon kaj... senembarase eliras el la minejo. La sekvantajn tagojn oni eĉ ne postkuris la forestantan sklavon. Sed, post longa marŝado, kiam li atingas forirontan ŝipon, li liveras sian sekreton al la ŝipestro ... La morgaŭon li estis morta.

Morta estas la sklavo. Eligita el sia sanga ŝelo estas la diamanto. Vendita al Anglo, la filo de Ministro Pitt. Post kelkaj transakcioj, la diamanto venas en la manojn de la financisto Law, kiu ĝin proponas al Philippe d'Orleans, Regento de Francujo, apud la sep-jara Louis XV. Timigita de la kosto (2.500.000 pundoj) postulata por tiu eksterordinara gemo (krudo, je 410 karatoj) preskaŭ ronda kaj dika kiel rendklodo-pruno, la Princo unue rifuzis. Sed, premita de Law, konsilita de Saint-Simon, li konsentas kaj garantidonas 2 milionojn da juveloj ĝis la tuta elpago de tiu enorma juvelŝtono.

Philippe d'Orleans timis, ke Historio riproĉu al li tiun luksegan elspezon. Kontraŭe, la kapricema

Historio donis lian nomon al tiu dikege blanka diamanto ; kvadrate tajlita kun rondigitaj anguloj, ĝi estas nun en Louvres-muzeo, kie oni povas ĝin admiri ; estas « La Regento ».

La dikegaj diamantoj, kiuj eniris en la Historion, havas propran nomon : estas Sancy, Koh-i-Noor, Polusa Stelo, Eŭgenio. Kaj cent aliaj.

Golconde

En Golconde (hodiaŭ Hiderabad) ĉefurbo de Hindustano, reĝis de 1512 al 1697 islama dinastio. La sultanoj tie akumulis nekredeblan kvanton da juvelŝtonoj, ofte elvokitaj en literaturaĵoj ; ĝis 1866 ĉiuj diamantoj venis unue el Golconde kaj poste el Brazilo.

Kimberley

En 1866, knabeto Erasmus Jacobs ludis ĉe bordo de la riverego « Orange ». Li trovis strangan ŝtonon, kiun li metis en sian poŝon, kie lia patrino ĝin trovis ; ĝi mirigis ŝin ; ankaŭ najbaro miris pri ĝi ; iu pensis, ke ĝi povus esti diamanto. De tiu dato, Kimberley eniris en la diamanto-historion ; en 40 jaroj oni ekstraktis, en tiu Sud-Afriko, 30 tunojn da diamantoj (dum Golconde donis nur 5 tunojn da gemoj en pli ol 2 000 jaroj). La minoj de Kimberley estas « primaraj », t.e. ke la diamantoj estas en sia origina tero : estas en la ĉi-tieaj gigantaj kamenoj, ke la diamanto formiĝis meze de la teraj bolantaj konvulsioj, ĉe temperaturoj kaj premoj neimageblaj.

La « Kimberlito » estas helblua lafo en kiu la diamanto formiĝis antaŭ miliardoj da jaroj : pura volatila karbono kristaliĝis en diamantojn. Kiam erozio translokis tiujn lafojn, oni trovas la diamantojn en la fluejo de la riveroj aŭ en aluvi-regionoj ; ĝi ankaŭ povas esti je centoj da metroj pli profunde.



En ambaŭ kazoj oni devas ekstrakti, elekti, lavi, dekanti 250 tunojn da kimberlito por ricevi unu-karatan diamanton.

« Cullinan »

Estas en tiu ŝelo, ke oni trovis la « Cullinan » unika kristalo, neimagebla : 3 106 karatoj : 620 gramoj.

Tiu malkovro, kiun oni ne povis kaŝi, fascinis ĉiujn friponojn en la mondo. Oni ruzis : la mirinda diamanto estis sendita al Londono, kiel simpla poŝta pakaĵo dum ĝia duoblo (en facetita vitro) aliris Anglujon sub bona eskorto.

KVALITOJ DE BELA DIAMANTO

Pureco :

Oni ĉiam parolas pri pureco de diamanto, pri ĝia « akvo » (diafaneco). Diamanto estas pura, kiam nenia kristalaĵo, nenia makulo estas perceptebla de lerta okulo, sub bona lumo, helpe de lupeo grandiganta ne pli ol 10 fojojn. Diamanto V.V.S. (angle : very, very slight = vere vere pura) entenas nur unu aŭ preskaŭ neperceptebla malperfektaĵojn. La diamanto « pikita » povas enteni kristalon videblan nur per lupeo ; se ĝi bone enlasas la lumon, ĝi nur malmulte malpliigas ĝian valoron.

Koloro :

Kiu diras « diamanto » diras « blanko ». La plej pura blanko plej ĝuas serĉatecon ; poste oni povas renkonti 200 blanko-nuancojn ; la « tera » blanko estas nete senvalorigita ; diamantoj povas montri pli apartajn kolorojn : bluo, rozkoloro, jonkvilo-flavo, verdo, konjak-koloro, bronzo-koloro.

Pezo :

Ĝi esprimiĝas en karatoj. La plej dikaj ŝtonoj estas la plej raraj kaj sekve la plej multekostaj. *Karato* estas 1/5 de gramo ; ĝi estas la mezur-unuo adoptita en la tuta mondo por pesi la juvelŝtonojn.

Tajlado :

Kia ajn estas la formo de la gemo : ronda, ovala, pirforma, la tajlado devas estis perfekta.

Malnova kaj moderna tajlado

Dum Antikveco, en Hindujo, la diamantoj estis facetitaj ; oni ilin poluris laŭ la facoj de la origina kristalo.

En Eŭropo estas al Jacques Cœur, ke oni ŝuldas la unuajn facetitajn diamantojn. Inter la malnove tajlitaj diamantoj, kelkaj estas tre belaj. Sed la moderna tekniko, ĉe dikeco de la juvelŝtono kaj klino de la facetoj, obeas precizajn regulojn de optiko, por ke ĉiu lum-radio estu tute refraktita kaj resendita al la sufacaĵo de la gemo ; tiamaniere oni obtenas kiel eble plej belan brilegon. Pro tiuj optikaj reguloj la nuntempa tajlado ne malmodiĝos kaj restos la plej efika.

Oni devas scii, ke unu-karata diamanta moderne facetita pli valoras ol unu-karata diamanto malnove tajlita ; kaj eĉ se ĝi perdas iom da pezo, malnove tajlita diamanto plivaloriĝos post moderna tajlado.

VOJAĜO AL MARSO

En nia Galaksio niaj rigardoj iras al Suno kaj al ĝiaj planedoj : Uranuso, Neptuno, Plutono, tiel malproksimaj, ke estas tre malfacile ilin studi. Kaj Jupitero, Saturno senĉese kaŝitaj en gasa envolvaĵo, kiu ne permesas vidi ilian surfacaĵon. Merkuro estas nur punkto, kontraŭsunlume lokita kaj dronita en la suno-fajroj. Venusa, kiu (malgraŭ antikveca reputacio pri nudeco) ĉiam vualiĝas je nuboj. Marso estas unu el la fratinoj de la Tero, kiu plej afable montriĝas al ni.

Jam de tre longa tempo Marso intrigis la homojn. Egiptoj, Kaldeanoj, kaj Asirianoj estis jam rimarkintaj ĝian ruĝan fajreron. Kaj 25 jarcentojn antaŭ nia erao, la dua tago de la semajno, mardo, jam portis la nomon de la fama planedo. En la ruinoj de Ninive (urbo fama en la jaroj 1700 antaŭ Kristo) oni trovis tabelojn rilatantajn, per kojno-formaj karakteroj, observaĵojn pri Marso. Tamen estas pli malfrue (272 ant. K), ke oni raportis pri pli precizaj detaloj. La Persoj nomis « Marso » la milito-dion. Tio ege simpligis la konscienc-problemojn de la generaloj.

PLANEDO estas grek-devenanta vorto, kiu signifas « vaganta ». Tiu unua konstato kondukis al sinsekvaj malsamaj teorioj :

En la II-a jarcento famiĝis *Ptolemeo* (140). Li estis greka astronomo (sendube naskiĝinta en Ptolemaïs - Egiptujo) ; ĝia « Matematika Kunmetado » kaj ĝia « Geografio » estis aŭtoritataj dum la tuta Mezepoko. Li opiniis nian Teron fiksa korpo, Centro de la Mondo (tiu hipotezo desegnis trajektoriojn de planedoj tre komplikajn).

En Mezepoko jen la granda pola astronomo *Koperniko Nikolao* (1473-1543). En sia fama « Traktaĵo pri rivoluoj de la ĉielaj mondoj », kiun li publikigis kelkajn tagojn antaŭ sia morto, li demonstris la duoblan movon de la planedoj : sur si-mem (aksumado) kaj ĉirkaŭ Suno. Li asertas, ke Suno estas fiksa kaj ke planedoj ĉirkaŭiras ĉirkaŭ ĝi. La Kopernik-sistemo estis tute nova vidpunkto en la mondo de la astronomoj.

Tycho-Brahé estis dana astronomo (1546-1601). Li ne akceptis la Kopernik-sistemon ; kaj li opiniis, ke la perspektivo de la steloj devus esti sanĝiĝintaj pro la movo de a Tero. Fakte tiu translokiĝo ekzistas ; ĝi estas tre malgranda ; sed ĝi estas la bazo-mem de la trigonometria difino de la interstelaj distancoj (determino efektivigita de post la XIX-a jarcento).


Galilejo estis fama italo (1564-1642), matematikisto, fizikisto, kaj astronomo ; por esplori la ĉielon li konstruas en Venecio (1609) la unuan astronomian lornon. Li konstatas la aksumadon de Luno ; li tute konsentas kun la Kopernik-sistemo. Sed la tiamaj skolastikuloj kaj la Romo-Kortego kontraŭstaras lian aserton kaj devigas lin konfesi sian eraron. Tamen li sukcesis noti en libro ĉiujn pruvojn pri Kopernik-teorio kaj ĉiu el ni konas lian parolon « Eppur si muove ».

Kepler (1571-1630) estis germana astronomo kaj fama matematikisto, disĉiplo de Tycho-Brahé, li uzas liajn « Observojn » por determini la planedajn orbitojn. Li interesiĝas pri Marso kaj precizigas ĝian astran rivoluon, kiu daŭras 687 tagojn. Plie li indikas, ke la Marsa orbito estas elipso, kies centro estas Suno. En interesa libro « Nova Astronomio » li notis siajn konkludojn, pri ĉiela mekanismo, kiuj gardis lian nomon « la Kepler-leĝoj ».

Newton (1642-1727) estas angla matematikisto, fizikisto kaj filozofo ; en astronomiaj studoj li uzis la laborojn de Kepler kaj malkovris la leĝon pri Universala Gravito « ĉiuj korpoj altiriĝas inter si, proporcie je la produto de ilia maso kaj inverse (potenco 2) de ilia distanco.

Multaj aliaj interesiĝis pri la ĉiela mekanismo kaj pri kemia komponaĵo de la Universo : Filozofoj (Descartes - Kant), Matematikistoj (Laplace - Poincaré H., Roche E., Sir G.H. Darwin), Fizikistoj, inter kiuj Birkeland.

La unuaj desegnoj kaj mapoj de Marso estas de Fontana (1630), William Herschell (1799), Schiaparelli (1879) de Lockyer, de Lowell, de Antoniadi. Ili montras malhelajn regionojn (ĉu maroj ?) helajn regio-



nojn (ĉu montoj ?), riveregojn (ĉu kanaloj ?) ruĝajn makulojn (ĉu dezertoj ?).

En « Palaco de la Malkovro » S-ro Antoniadi prezentis pri Marso grandan mapon, kaj belegan globon, arte pentritan per rozkoloro kun verdaj makuloj. Montoj, valoj, riveroj ricevis latinajn nomojn (Mare Acidalium ; Syrtis Major, Solis Lacus, Deltoton Sinus, Sinus Meridian ; k.t.p.).

En 1879, S-ro Schiaparelli, direktoro de la Observatorio de Milano uzas specialan lornon (apertu-

ro 22 cm.). Li asertas, ke sur Marso estas tuta reto da kanaloj (proksimume 4.000-5.000 km) S-ro P. Lowell konstruigas en Alaska la observatorion de Flagstaff ; la ĉi-tiea lorno estas 46 cm.-larĝa kaj S-ro Lowell malkovras veran araneaĵon de kanaloj kaj eĉ diras « La marsaj inĝenieroj fosis tiujn kanalojn por akvumi sian soifantan mondon ». Kaj kvereloj eksplodas inter « kanalistoj » kaj « kontraŭ-kanalistoj ». Fine S-ro Antoniadi instaliĝas en Meudon kun lorno 83 cm. En sia libro « Planedo Marso » (1930) li konkludas : « Ne estas kanaloj sur Marso, sed temas pri linioj pli malpli regulaj. »

En 1941, la M-to Wilson havas teleskopon (1,52 m) kaj tiam oni konsideras tiujn « kanalojn » kiel grundo-akcidentojn ŝulditajn al la konvulsioj de la marsa « ŝelo ».

Kompreneble, la ĵurnalistoj plej fantazie cerbumis : Kiamaniere korespondi kun la Marsanoj ? Oni elpensis metodojn : kelkaj proponis transmeti konvenciajn bildojn (punktoj je punktoj) ; aliaj intencis uzi Lunon kiel spegulon por reflektigi lumajn signalojn ; alia haste preparis specialan telegramkodon por marslingve skribi...

Kaj pri atmosfero, ĉeesto de akvo, arbaroj, vegetalaro, meteorologio, vivo sur Marso, naskiĝis diversaj hipotezoj. Tio estis farenda laboro por la estontaj generacioj !

PRECIZOJ PRI MARSO

De jam longa tempo oni faris kompleksajn kalkulojn kaj observadojn. Marso estas malgranda planedo : diametro 6.850 km (1/2 de Tero) ; Surfaco 1/4 de Tero ; Maso 1/10 de Tero ; Gravito 0,37 = 1/2 de Tero. Tamen Marso havas du satelitojn Deimos kaj Fobos. Sur Marso, tago daŭras 24 h. 37 m., 23 s. ; la rivoluo ĉirkaŭ Suno daŭras 687 tagojn ; la sezonoj estas pli longaj ol sur Tero. La marsa akso estas same klinita kiel la nia. La atmosfera premo estas 10-foje malpli forta ol la nia ; tamen oni konstatas nubojn ĝis 30 km. super la grundo. Marso estas pli malproksima de Suno ol Tero ; ĉirkaŭirante Sunon la 2 planedoj faras elipsojn. Tiu de Marso estas pli granda kaj pli elipsa. En ilia rivoluo ĉirkaŭ Suno la du planedoj povas esti en « opozicio » (Tero pasas inter Suno kaj Marso) ; tiukaze ilia distanco varias inter 56 kaj 98 milionoj da km. Kiam ili estas ambaŭflanke de Suno, t.e. « en Konjunkcio » ilia distanco estas 400 milionoj da km. La periheliaj — 56 km. — opozicioj estas raraj kaj kompreneble multe preferataj de la astronomoj. Ili okazas, alterne, je ĉiuj 15 aŭ 17 jaroj (1924 - 39 - 56 - 71... k.t.p.).

KUNE KUN LA « MARINER »

En 1965, Mariner-4 kovris 520 milionojn da km., je rapideco 40.000 km/hore ; ĝi preterpasis Marson 7 monatojn pli poste ĉe altitudo 9.600 km. La fotojn, kiujn ĝi elsendis mirigis la astronomojn : estis nek kanaloj, nek magneto-kampo, preskaŭ neniu atmosfero, sed miloj da krateroj, kiel sur Luno.

En 1969, Mariner-6 forĵetita kiel kuklego tra la steloj bezonis nur 5 monatojn por tiu fabela vojaĝo : 400 milionoj da km. (1.000-foje la distanco Tero-Luno) ; tute sola, sen ia helpo tra la vakuo de la interplaneda Spaco ĝi alvenis proksime de Marso je 3.400 km.

Unu monaton pli poste, Mariner-7 kun siaj flugiloj etenditaj al Suna vento sekvis la saman vojon ; sed ĉi-foje temis pri nur 320 milionoj da km.

La kamero de Mariner-6 permesis distingi detalojn larĝajn je 300 km. (ekzemple : same kiel se vi povus legi polican avizon sur via aŭtomobilo distanca je 5 km).

Fine de Februaro (156 tagoj post ĝia ekiro) Mariner-6, trakurinte 410.000.000 da km. superflugis (je 3.400 km) la ekvatorian regionon de Marso ; estis aŭtuno (notu : kompare kun tiu marsa aŭtuno, siberia estas nur freŝiga venteto por amindumantoj) Mariner-6 daŭre kuras sur sia orbito kaj la 30-an de julio estas super la ruĝaj dezertoj (la radio-signaloj bezonas 5 1/4 minutojn por atingi nin kaj la kamero sendas 74 fotojn).

En 1969, Mariner-7 ekflugas la 27-an de marto. Li trakuris nur 320 milionojn da km. (flugdaŭro = 130 tagojn). La 4-an de aŭgusto li superflugas la Sudan Poluson ; estas printempo : (neĝo kaj prujnovento) la aparato sendas 126 fotojn.

Alproksimiĝante la « Mariner-oj » vidis oranĝkoloran sferon pli kaj pli dikan. La krateroj estas multaj, multegaj, enormaj ; (diametroj : de 300 ĝis 800 km.) ; ili estas kovritaj je prujno ; kelkaj estas rondformaj pro erozio ; ŝajne la plej freŝdataj staras sur la plej antikvaj. Heleco aŭ malheleco de kelkaj regionoj ŝajne similas niajn dezertojn ; ili estas submetitaj al teruraj pulvo-ventegoj. Tie kaj ĉi tie larĝaj valoj, profundaj foldoj (ĉu kanaloj ?) kaj eĉ rondforma kresto.

Temperaturoj : Ni ne forgesu, ke Marso estas pli malproksima de Suno ol nia Tero. Laŭ la loko : 17° C., 22° C. je tagmezo. Dum nokto — 75° ; eĉ oni opinias, ke ĉe poluso tiu nokta temperaturo povus atingi — 160° (je tiu temperaturo la karbona dioksido iĝas karbona neĝo). Pri la kolorŝanĝiĝoj laŭ la sezonoj (malheleco kiu pli kaj pli atingas Nordon) oni ankoraŭ havas ne sufiĉan klarigon.

Atmosfero : La konkludoj estas ankoraŭ diversaj. Tamen ĉeesto de karbona dioksido estas certeco. D-ro Pimental opinias, ke estas akvo sub formo de neĝo-nebulo. Li pensas, ke la karbona neĝo ĉe suda poluso protektus ĉiun vivantan estaĵon kontraŭ la sunaj ultraviolaj radioj (mortigaj por la Teraj organismoj).

Sur la polusaj regionoj infraruĝa analizo montras amoniakon kaj metanon ; ultraviola analizo ne montris azoton en la alta atmosfero ; sed eble ĝi ekzistas en la basa atmosfero aŭ estas difuzita en la grundo. Oni trovis ankaŭ kvanteton da atomika hidrogeno kaj oksigeno.

Ni menciu ke la unuaj « Mariner » pezis 413 kg. En 1971, Mariner-9 pezas 970 kg. ; ĝi entenas retrofuzeon (kun 440 kg. da brulaĵo) por sateligi Mariner-9 ĉirkaŭ Marson.

Kaj nune Mariner-9 sendas fotojn plej interesajn; ŝajnas, ke sur Marso okazas fenomenoj ĝis nun ne observitaj : Ili transformas la geologian aspekton de la planedo : la ĵus detektitaj detaloj ne ekzistis antaŭ 2 jaroj.

Konkludo : Marso estas evoluanta korpo.

grésillon 20-jara

Kiel anoncite en la lasta numero de Kulturaj Kajeroj, ni proponas al vi, hodiaŭ, artikolon de S-ro De Waard pri la « Unuaj Jaroj de la Esperantista Kulturdomo ».

Ni nepre volas aldoni, antaŭ ol lasi la parolvicon al S-ro de Waard, ke la pionira agado de Ges-roj Micard, kvankam ĝi estis la ĉefa elemento de la unuaj jaroj de la Esperantista Kulturdomo, tamen ĝi havus neniun efikon se ne ekzistus tiuj multnombraj amikoj kiuj apogis ilin per vizitoj al la kastelo en tiuj senkomfortaj pioniraj unuaj jaroj. Ges-roj Micard mem ofte asertis ke tiuj amikoj ne nur alportis la monon necesan por pagi ĉiujn pagotaĵojn, sed ankaŭ ili donis al ili netakseblan kuraĝigojn montrante ke ili prave kreis la Esperantistan Kulturdomon, kaj donante pluan kuraĝon por la venonta laboro kiun ili faris dum pli ol 12 jaroj.

La nunaj esperantistoj ankaŭ multe ŝuldas al tiuj pioniraj Grésillon-anoj.

LA UNUAJ JAROJ DE LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Jam dudek jaroj pasis post la malfermo de la Esperantista Kulturdomo Grésillon, oni skribis al mi. Ĉu estas vere ? Mi rigardas min en la spegulo kaj mi rigardas en mia albumo la fotojn de la oficiala malfermo en 1952 : jes, estas la vero, dudek jaroj pasis !

Miaj pensoj reiras al tiu unua bela somera periodo, mi vidas min forlasi la parizan rapidvagonaron en Le Mans je bela dimanĉa mateno kaj transiri en — por nefranco — strangan vagonon « omnibustrajno ». Kiom da stacioj ĝis Baugé ? Mi ne scias kaj dum tiu mia unua vizito al Francujo mia scio de la franca lingvo ne estis kontentiga, pro kio mi ne kuraĝis alparoli unu el la multaj babilemaj pasaĝeroj. Tamen fine : Baugé.

Kun mi eliras tri-kvar tipaj kamparanoj, videble tre celkonsciaj. Mi hezite paŝas al la stacidomo, sed tuj venas renkonte al mi iom kripla, vera franco : Henri Micard kun la ĉiam fidela baska ĉapo sur la kapo. Jen renkonto neforgesebla : homo simplega laŭ ekstero sed kolosa laŭ spirito, kiu disradias specialan etoson ĉirkaŭ li.

Per sia iom pratempa aŭtomobileto li kondukas min al la kastelo, pri kiu mi precize antaŭ dek tagoj legis por la unua fojo. Impresa ĝi staras ĉe la fino de la enireja aleo, malantaŭ intima lageto. En la salono mi tuj kaj senhelpe perdiĝas en la tumulton de la ĵus finiĝinta tagmanĝo. Kiom da manoj mi premis, kiom da nomoj mi aŭdis ? Akvofale rapide diskutas tiuj francaj gesamideanoj...

Sed min savas la kompletigo de la genia Henri Micard : lia edzino, la ĉiam vigla, energia, laborema sinjorino Micard. Rapide ŝi aranĝas denove manĝon por la malsata nederlandano, rapide ŝi babilas dumtempe. Jes, kio **ne** estas rapida en sinjorino Micard ? En la postaj semajnoj mi vidas, ke ŝi laboras senfine : kuiras, purigas, lavas telerojn kaj littukojn, sed ĉiam vigle babilante. Ĉu en Esperanto aŭ en franca lingvo ? Neniam mi scios tion. Tio cetere ne gravas. Ŝia simpatia sinprezento faras lingvon komunan superflua. Tamen unu esprimon utilan mi lernis de ŝi kaj mi neniam forgesos ĝin : en momento de kaosa bruhaha ŝi diris, ke ŝi « futas la kampon » ! La pure zamenhofaj esperantistoj eltiros siajn kapharojn pro tiu esprimo, sed ĉiu franclingvano ĝin englutos kiel dolĉan vinon.

Geedzoj Micard : la nuna glate funkcianta Kulturdomo ne estus ebla sen ilia senlima pionira laboro, ĉion kio estis necesa, ili faris. Multaj aranĝoj estis ege simplaj en tiuj unuaj jaroj kaj la komforto ne estis grandhotela. Por mi tiu unua pionira periodo restos la plej bela. Komprenu min bone : havi varman akvon en la ĉambroj estas agrable, la ebleco duŝi ĉiutage estas agrabla, la

naĝejo estas valora, bone meblitaj ĉambroj estas komfortaj por feriantoj, sed por mi la vera Grésillon restas la Grésillon de 1952 kaj postaj du aŭ tri jaroj.

Mi manĝis bonege, por nefranco la artiŝokoj aŭ la odoranta Camenbert estis aventuraj, sed ni **ne** uzis du aŭ tri telerojn dum ĉiu manĝo, simple pro tio, ke oni ne havis sufiĉan kvanton. Mi dormis bonege, sed la lito estis iom kripla, la littukoj iom grizaj, la kompleta meblaro de mia unupersona ĉambro konsistis el unu lito kaj unu seĝo. Sur la muroj estis iom strangaj makuloj, la krano ne ĉiam donis akvon kaj por elektre razi min mi staris piedpinte sur la sola balanciĝema seĝo : mi ja devis meti mian kontaktilon en la « ŝtelisto », kiu troviĝis en la lampeto, la ĉambro estis alta kaj mia ŝnuro mallonga...

Se la materia malsufiĉo de la unuaj jaroj estis jam alloga, ankoraŭ pli alloga estis la spirita atmosfero. Tuj de la unua aranĝo realiĝis la revo de Henri Micard : kvazaŭ en komuno kunvivis homoj diversnaciaj, neniu estis nek sentis sin pli altranga ol alia. Ĉiu senpolvigis sian propran ĉambron kaj brave remetis la ilojn en la koncernan ŝrankon, ĉiu mem rearanĝis sian liton, ĉar ĉambristinoj ne estis. Alten flugis la komuna sento dum la « senharigo » de la fazeoloj, ho pardonu, ni eĉ diris « harikotojn » ! Jes ja, mi ripetas, la uzata lingvo en tiuj unuaj jaroj ne ĉiam estis pure zamenhofa kaj oni ne parolis senescepte Esperanton. Koleretis pro tio maljuna sinjorino, okazis vespera diskuto pri tio kaj denove estis la vastanima Micard, kiu repacigis la partiojn. La Esperantista Kulturdomo ne estis destinita senescepte por perfekte parolantaj esperantistoj.

Modesta do estis la materia komenco. Dum pluraj jaroj mi revenis por gvidi kursojn, fari prelegojn, montri filmojn kaj ridigi vespere la ĉeestantojn. Ĉiun jaron mi vidis pliperfektigon de la materiaj flankoj, iom perdiĝis la pionira aventuremo, sed restis la internacia harmonia sfero sen kvereloj, pri kiu Henri Micard revis. Li mortis korpe, sed lia spirita konstruaĵo restis kaj alten evoluis. Tia homo saĝa li ja estis : li ne agis por propra gloro dum sia vivo, sed bonege konante siajn modestajn fortojn li « bredis » posteulojn, kiuj daŭrigas la penadon por Grésillon en la origina senco.

Por ĉiuj kiuj partoprenis en la unuaj jaroj de la Esperantista Kulturdomo tiu ĉi franca kastelo restas kulturmonumento funde en la koro, precipe pro la senlima libereco kiu regis. Kiam mi nun returnevidas al tiuj unuaj jaroj, en mia memoro revenas unualoke tiu granda perfekta libereco, kiun mi spertis tie, libereco ĉiurilata, celita de Henri Micard kaj respektita de ĉiu gasto.

M. de WAARD.



Gesinjoroj Micard
serĉas ĉambron por neatendita nov-alveninto

GABRIELLA MISTRAL

Gabriela Mistral estis ĉefe konata kiel poetino. Tamen ŝi devus esti same agnoskata kiel prozistino, kies verko riĉiĝis de la sentivaj ecoj de la poetino. Ŝi estigis intiman ligon inter poezio kaj prozo, kaj ŝia prozo ofte estas poezia, samkiel ia poezio havas la vivecon de la parolata vorto. Por ŝi, kiel por Jacques Maritain, elvolvigi amon al belo estas rimedo por alproksimiĝi al Dio kaj al perfektiĝo. Kiel la mistikuloj, kaj ankaŭ kiel la filozofoj de antikva tempo, ŝi serĉadis la esencon de la estaĵoj, kaj vidis belecon en humila ago, en intensa esprimo de spirita angoro, en rozo aŭ en radiko kaŝita sub la tero

Ĉu poeziaĵoj, ĉu prozaĵoj, ŝiaj verkoj surhavas fortikan personan stampon. La temoj kaj stilo estas neerareble ŝiaj. Ili estas la esprimo de profunde religia homo retrorigardante al Mezepoko, por trovi veran artan kaj moralan senton, kaj rigardas al la estonto por doni al nia nuntempa epoko renovigitan kaj vivigitan fidon. Ŝi transdonis mesaĝon eliĝintan el ŝia profunde enradikigita sento pri socia justeco, fondita sur fundamenta kristaneco. Ŝia verkaro estas centrigita al la junularo.

Tial, Gabriela havis religian sintenon kontraŭ ĉia verka formo. Ŝi posedis fortan etikan kaj estetikan senton kaj paraleligis la unuiĝon de la mistikulo kun Dio, kaj la unuiĝon de la verkisto kun lia « **métier** ». Ŝi neniam ĉesis esti laboristo strebanta al laborajo elfinita per malfacila laboro pli ol per nura fido al inspiriĝo. Ŝi trudis al sia artaĵo la turmentigan faron kaj refaron. Mi memoras, ekzemple, okazaĵon kiam ŝi petis, ke mi recitu kelkajn el ŝiaj poemoj ĉe la « Pan-American Women's Association ». Kiam mi provdiris tiujn poemojn antaŭ ŝi, ŝi plurfoje interrompis min por ŝanĝi unu aŭ du vortojn. Kvankam tiuj poemoj troviĝas en libro publikita antaŭ pli ol dudek jaroj. Ŝi estis neniam memkontenta verkisto, kvankam elfininte puregan artan formon, ŝi rigardis sian verkon kun humila sento. Sendube ŝi estis sia propra plej postulema kaj akra cenzuristo. Eble la plej alta religia klimakso de ŝia verkaro estas la jenaj tri ordonoj el ŝia **Dekalogo de la Artisto :**

I. — Ci devas ami la belon, ĉar ĝi estas la ombro de Dio sur la universo.

VIII. — Ci devas oferi cian verkon kvazaŭ ĝi estus filo, enmetante en ĝin cian sangon dum miloj da tagoj.

X. — Ci devas fariĝi hontanta pri cia kreaĵo, ĉar ĝi estas malsupera je cia revo.

La fundamenta fonto de ŝia poezio estas la Biblio, ĉefe, la libro de Ijob, la Alta Kanto, kaj la Psalmaro. Ŝi konsideris la Biblion, ne kiel studotan libron, sed kiel amendan libron, potencan amikon kaj kunulon. Ŝi skribis : « Miaj pli bonaj amikoj ne estis samtempuloj ; ili estis tiuj, kiujn vi donis al mi : Davido, Rut, Ijob, Rafiel, Maria ». En la Biblio ŝi trovis ambaŭ forton kaj tenerecon, simplecon, kaj superan poeziecon. Iuj vortoj uzitaj de Gabriela estas fortikaj kvazaŭ eltranĉitaj el roko ; aliaj estas dolĉaj, spegulantaj abundecon kaj serenecon. Per la uzado de vitalaj vortoj, ŝi riĉigis la Hispanan lingvon, aldonante al ĝi novan sentemon, varmecon, kaj intensecon, kun speciala emfazo pri la parolata mesaĝo.

Ŝiaj libroj estis publikitaj, nur ĉar iu alia iniciatis, aŭ kiam la publikigo povis helpi bonan celon. **Desolacion** (Afliktiĝo) estis publikita en 1922 fare de la Hispana Instituto en Usono, pro impulso de Federico de Onis, kaj de grupo de junaj Usonaj instruistoj kiuj, per ĝi ektrovis ŝian poezion, ĝis tiam nekonata en Nord-Ameriko. **Ternura** (Tenereco) libro de lulkantoj (el kiuj kelkaj jam aperis en **Desolacion**) estis publikita en Madrido en 1924, por ke ĝia muziko lulu patrinojn kaj infanojn per dolĉa kaj tenera movo. Ŝia tria libro **Tala** financita de ŝia amikino Victoria Ocampo estis publikita en Argentino en 1938. Per ago malavara kaj ama, ŝi donacis la profitojn de la libro por la infanoj orfigitaj de la civila Hispana milito. Kiam Gabriela revenis en Ĉilion post deksesjara foresto, ŝi ricevis tian varman bonvenon de siaj samlandanoj, ke ŝi danke dediĉis al sia patrujo sian libron **Lagar.** La postmorta verko Poema de Chile (Ĉiliaj poemoj) laŭdas ŝian landon — ties fruktojn, florojn, arbarojn, montojn, kaj maron. En tiu libro, ŝi revenas al Ĉilio post sia morto en spirita formo, kaj estas videbla nur de unu infano kaj de unu damao, kun kiuj ŝi promenas tra la lando kaj per poezia dialogo klarigas al ili la belecon de naturo.

Desolacion elmontras ŝiajn personajn amon kaj suferon ; en **Ternura** kaj **Tala,** ŝian suferon transformitan en universalan amon. En **Lagar** kaj **Poema de Chile,** Gabriela aperas malligita el sia fizika memo per sublima amo al la aliaj. En la poemo **Sin-disdono,** ŝi skribis :

Se oni lokus apud mi
la denaskan blindulinon,
mi dirus al ŝi milde, milde
per voĉo polvoplena :
Fratino, prenu miajn okulojn.
.....
Alia prenu miajn brakojn,
se ŝi estas kripla,
kaj aliaj prenu miajn sensojn
kun iliaj soifo kaj malsato.
.....
Mi estu tiam konsumita,
distranĉita kiel panbulo,
alĵetita de nordo al sudo,
mi neniam plu estos unu.

Pro tiu memforgeso favore al la subprematoj kaj senhavantoj, Gabriela povas esti nomata mistikulo, sed ne laŭ la ortodoksa tradicio. Ŝia fido ne estis donita al ŝi per dogmoj, sed estis rekta vizaĝ' al vizaĝa renkontiĝo kun Dio. Malsame kiel la Hispanaj mistikuloj, ŝi ne ekunuiĝis al Dio per kontemplado kaj sereneco, sed per angoro kaj turmento. Ŝia unuiĝo kun Dio enradikiĝis en socia justeco, kaj universala amo al homaro. Tial ŝia poezio estas esprimo de ŝia animo, foje senpara dialogo inter Dio kaj ŝi, aŭ inter Lia kreitaro kaj ŝi mem. Ĝi elvenas el ŝia vivado, kaj ties esenco estis malegoista memdono.

Gabriela Mistral, virino, edukistino, batalanto por socia justeco, kaj verkisto estas nur unu. Se ŝiaj konversacioj estus raportitaj, ili estus arta verko kuniganta estetikon kaj ankaŭ terecon en maniero esence ŝia. Kiam Victor Andrés Belaunde, la estinta reprezentanto de Peruo ĉe la Unuiĝintaj Nacioj, komparis ŝiajn konversaciojn al parfumo, li priskribis la aŭreolon ŝin ĉirkaŭantan. Gabriela Mistral daŭre vivas en siaj poemoj, prozaĵoj, kaj en la idealoj, kiujn ŝi inspiris al tiuj, kiuj alvenis al ŝi. Naskiĝinta en Ĉilio, ŝi nun apartenas al la tuta Latin-Ameriko kaj al la tuta mondo.

Laŭ Marie-Lise GAZARIAN,
profesoro de hispana lingvo en Nov-Jorko.
Tradukis Eloi MOTILLON.

A. PUŜKIN

Fabelo pri fiŝisto kaj fiŝo

Vivis iam kun sia edzino
apud maro fiŝisto maljuna.
Ili loĝis tie dum tridek tri jaroj
en malnova terkabaneto
Li fiŝojn kaptadis per reto,
Ŝi sian ŝpinilon turnadis.

Foje maren li ĵetis la reton -
ĝi revenis kun nura ŝlimo.
Duan fojon li ĵetis la reton -
ĝi revenis kun mara herbo.
Trian fojon li ĵetis la reton -
ĝi revenis kun unu fiŝo,
kaj ne simpla ĝi estis, sed ora.

Ekpetegis lin la ora fiŝo ;
parolante per la voĉo homa :
« En la maro min forlasu, patro !
Mi tre karan donos elaĉeton -
Kion ajn vi deziros, mi pagos ! »

Ekmiregis la fiŝisto kaj ektimis :
li fiŝkaptis dum tridek tri jaroj,
sed neniam aŭdis parolantan fiŝon !
Liberigis li la oran fiŝon
kaj al ĝi afablan vorton diris :
« Dio vin favoru, ora fiŝo !
Vian elaĉeton mi ne prenos.
Iru pace en la vastan maron
kaj promenu tie en libero ».

Li revenis al sia edzino
kaj rakontis pri tiu miraklo :
« Unu fiŝon hodiaŭ mi kaptis,
oran fiŝon, ne ordinaran.
Nialingve parolis la fiŝo,
petis ke mi forlasu ĝin hejme,
elaĉeton ĝi proponis riĉan,
ĉion ajn, kion mi dezirus.
Mi ne prenis de ĝi elaĉeton
ĝin senpage forlasis en la maro ».

Lin insultis la maljunulino :
« Mallertulo vi estas sencerba !
Ne profitis vi bonan okazon -
elaĉeton ne prenis de la fiŝo.
Se almenaŭ vi elpetus trogon,
ja la nia tute fendiĝis ».

Al la maro li tiam revenis.
Li vidas : ondetas la maro.
Kaj li vokis la oran fiŝon.
Ĝi alnaĝis al li kaj demandis :
« Kion do vi bezonas, patro ? »

Kun salut' la fiŝisto respondas :
« Korfavoru min moŝta fiŝo !
Tre insultas min mia edzino.
Ŝi ne volas min lasi en paco,
novan trogon ŝi volas havi,
la malnova tute fendiĝis ».

Al li diris la ora fiŝo :
« Ne malĝoju, iru kun dio,
Bone, novan trogon vi havos ».

Li revenis al sia edzino,
antaŭ ŝi la nova trogo.
Ŝi ne ĉesas, tamen, insulti :
« Mallertulo vi estas sencerba !
vi elpetis, stultulo, trogon !
Ĉu ĝi estas io valora ?
Iru. Petu denove la fiŝon :
eble ĝi al mi donos domon ? »

Al la maro denove li venis.
Malklariĝis la blua maro.
Kaj li vokis la oran fiŝon.
Ĝi alnaĝis al li kaj demandis :
« Kion nun vi deziras, patro ? »

Kun humil' la fiŝisto diras :
« Korfavoru min, moŝta fiŝo !
Ĉiam pli la edzino insultas
min ne lasas tute en paco :
domon volas la aĉa virino ! »

Al li diris la ora fiŝo :
« Ne malĝoju, iru kun dio,
bone, havos vi ankaŭ domon ».

Li revenis al sia kabano,
la kabano jam plu ne ekzistas,
antaŭ li estas dom' kun mansardo,
kun brika blankigita forntubo,
kun korta pordego kverkligna.

Ĉe fenestro sidas lia edzino,
lin per vortoj plej maldecaj insultas :
« Mallertulo vi estas sencerba !
Vi elpetis, stultulo, domon !
Iru, petu la fiŝon humile :
Mi ne volas plu esti kampulino,
ĝi min faru nobelin' altranga ».

Al la maro revenis la viro.
Maltrankvila estas la maro.
Kaj li vokis la oran fiŝon.
Ĝi alnaĝis al li kaj demandis :
« Kion nun vi bezonas, patro ? »

Kun humila salut' li respondas :
« Korfavoru min, moŝta fiŝo,
ĉiam pli la edzin' frenezumas,
min, maljunan, ne lasas en paco.
Ŝi ne volas esti kampulino,
volas esti nobelin' altranga ».

Al li diris la ora fiŝo :
« Ne malĝoju, iru kun dio ! »
Li revenir al sia edzino.
Kaj kastelon altan li ekvidas.
Ĉe la pordo staras lia edzino
en multkosta zibelpelta vesto.
Sur la vert' ĉapeto el brokato,

sur la kolo perloj peze pendas,
sur la manoj brilas oraj ringoj,
la piedojn ruĝaj botoj vestas.
Ŝin ĉirkaŭas favoraj servistoj.
Ilin batas ŝi, je l'haroj tiras.

Al ŝi diris kun salut' la edzo :
« Bonan farton, moŝta nobelino !
Ĉu animo via kontentiĝis ? »
Lin de si forpelis ŝi severe,
sendis servi en la ĉevalejo.

Pasis unu semajno, poste dua.
Frenezumas la virino denove.
Al la fiŝ' ree sendas la edzon.
« Iru, petu humile la fiŝon :
Mi ne volas plu esti nobelino,
mi estu reĝino libervola ! »

En teruro la viro ekpetegis :
« Ĉu, virino, vi perdis la saĝon ?
Nek vin teni, nek paroli vi povas -
Vi ridigos la tutan regnon ! ;

Koleriĝis pli la virino...
Sur la vango frapis la edzon
« Ĉu vi volas spiti, kampulo,
al mi, nobelin' altranga ?
Iru tuj al la mar', mi ordonas,
aŭ vin oni kondukos perforte ! »

Al la maro la viro iris -
tute nigra estas la maro.
Kaj li vokis la oran fiŝon.
Ĝi alnaĝis al li kaj demandis :
« Kion nun vi deziras, patro ? »

Kun humila salut' li respondas :
« Korfavoru min, moŝta fiŝo !

Denove la edzino ribelas.
Ŝi ne volas plu esti nobelino,
volas esti reĝino libervola ».

Kaj la ora fiŝo al li diras :
« Ne malĝoju, iru kun dio -
bone, estos laŭ ŝia deziro. »

Li revenis al sia edzino -
antaŭ li jen reĝa palaco.
Tie vidas li sian edzinon
ĉe festeno en reĝina vesto.
Servas ŝin bojaroj kaj nobeloj,
al ŝi vinojn verŝas ekzotikajn,
kaj ŝi manĝas kukon mieldolĉan.
Ĉirkaŭ ŝi postenas gardistaro,
halebardojn en la manoj tenas.

Konfuziĝis la viro. Sin sternis
antaŭ ŝi la vizaĝon altere.
Diris : « Bonan saluton, reĝino !
Ĉu vi estas nun tute kontenta ? »

Eĉ rigardon ŝi al li ne ĵetis,
nur forpeli el la dom' ordonis.
Tuj alkuris bojaroj kaj nobeloj
For elpuŝis lin per pugnobatoj.

Ĉe la pordo lin la gardistaro
kun minacoj volis halebardi.

Sur la strat' la popolo lin mokis :
« Laŭmerite vi, krudulo, ricevis,
tio estu por vi bona instruo -
ne imagu vin grava persono ! »

Du semajnoj plue forpasis.
La virino frenezumas denove
kaj venigi la edzon ordonas.
Oni trovis lin kaj alkondukis
antaŭ ŝian reĝinan vizaĝon.

Kaj ŝi diris : « Iru al la fiŝo !
Mi ne volas plu esti reĝino,
sed mi estu regantino de l'maro,
ke mi loĝu en la marprofundo,
kaj la ora fiŝo min obeu
kaj min servu kiel kuriero. »

La viro ne arogis protesti,
eĉ unu vorton ne diris kontraŭe.

Li venas al la maro kaj vidas
sur la maro furiozas ventego.
alte levas sin ondoj koleraj,
ili kuras kaj muĝas, kaj hurlas...

Kaj li vokis la oran fiŝon,
Ĝi alnaĝis al li kaj demandis :
« Kion nun vi deziras, patro ? »

Kun humila saluto li diris :
« Korfavoru min, moŝta fiŝo !
Kiel bridos mi la virinaĉon ?
Ŝi ne volas plu esti reĝino,
volas esti regantino de l'maro,
volas loĝi en la marprofundo,
ke ŝin vi, ora fiŝo, obeu
kaj ŝin servu kiel kuriero. »

Nenion respondis la fiŝo,
nur akvon per vost' plaŭdigis
kaj foriris en la marprofundon...

Longe li ĉe la maro atendis.
Poste al la edzino revenis.

Li ekvidis la malnovan kabanon :
sur la sojlo sidas lia edzino,
kaj antaŭ ŝi la fendita trogo.

(Traduko de G. Zaletov).

Kiam historio kaj legendo intermiksiĝas

En tiu tempo, precize la tagon antaŭ Pasko 1421, granda estas en Anĵu — tiom en la angla kampo, kiom en la franca — militpreparado de du armeoj, jam de 84 jaroj interbatalantaj, pli malpli sporade, pro heredaj postuloj de la du ambaŭaj reĝoj.

Aŭdinte pri grava armea kununuiĝo de la anĵua Gerin de Fontaine kaj de la skota grafo de Bukan, cele al neduba atako tuj post la Paskaj festoj, la angla duko de Klarens, subite kaj energie, decidas antaŭigi la malamikojn. Li ordonas al siaj kavaliroj tuj ekrajdi kaj sekvi lin jam saltanta sur sian plej bonan ĉevalon..... kiu, fakte, estas mulino ! !

Ve ! Neatendite, sur monteto inter la nova kaj la malnova « Baugé », li trovas la kontraŭulojn, frunte al li, tute pretaj por batali.

Per frapoj de pezaj batalmasoj, kaj de akrepintaj spadoj, la taĉmentoj de la duko de Klarens estis disrompitaj. Multaj mortis kaj, inter la unuaj, la duko mem : Sango fluis ĝis la rivereto « Couesnon », diras la historiistoj.

Tiel frenezigita estis la mulino, ke ĝi ekĵetiĝis el fortega ŝtonego, kaj en senespera kurssvingiĝo rekte al la ĉielo kunportis la rajdantan mastron.

Tiel forta estis la eksalto, ke survoje al ĉielo, nur flugtušante de la piedo la preĝejturon, la mulino toris ĝin poreterne.

Ĉu vi ne kredas min ?

Nu, kiam vi estos en Gresillon, iru promenante ĝis « Vieil-Baugé ». Antaŭ eniri la vilaĝon tuj frapos vin la stranga aspekto de la preĝejturo, kun spirala pinto forte klinanta al la sudo. Rigardu dekstren en la fosaĵo. Sur loko ankoraŭ nun nomita : la Batalo, Flanke de memortabulo pri ĝi, vi vidos, profunde impresita en ŝtonego, markon de ĉeval-piedo : Ja, tiu de la mulino de la duko de Klarens.

Kaj irante pli, ĝis la vilaĝo « Fontaine-Guérin », tiam vi povos vidi, sur la ĉefa placo, grandan statuon reprezentantan unu el la heroj de la batalo de « Vieil-Baugé », en bronza kiraso.

——

Do, karaj gelegantoj, sciu bone, ke en Gresillon vi praktikos esperanton, kaj plue, en la ĉirkaŭaĵoj konatiĝos kun tre malnova histori — kaj legend — riĉa franca regiono.

B. CHEVERRY.

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

En ĉi-tiu numero vi trovos la du lastajn problemojn de nia konkurso 71-72. Bonvolu sendi la solvojn antaŭ la fino de la monato sekvanta tiun dum kiu vi ricevas la gazeton.

Pro malfruo kaŭzita de diversaj flankoj (ne ĉiam kulpe de la redaktoro), ni akceptos la solvojn de la antaŭaj problemoj (de post la n° 5 Sept.-Okt. 1971) samtempe kun la solvoj de la hodiaŭaj problemoj.

UNUA PROBLEMO (20 poentoj) :

El la ĉi-subaj frazoj, kelkaj estas korektaj, kelkaj nekorektaj. Bonvolu korekti la nekorektajn. Sed atentu ! Estos kalkulitaj po 2 poentoj por ĉiu eraro ĝuste korektita, sed estos forprenita po I poento por ĉiu malĝusta korekto.

1) La lupo plenis la tutan arbaron per la bruo sia voĉo.

2) Sinjoro Korvo, sur arbo sidante, en sia beko tenis fromaĝon ; per la odoro vulpo allogite, tiel al ŝi parolis.

3) Konservu bone la sekreton, ke la edzo nenion scios.

4) Oni devas ĉiam esti pretaj.

5) Pli bone ridas tiu, kiu ridas la lastan.

6) Morgaŭ ni iros ĉe nia onklo.

7) En la daŭro de kelkaj monatoj, ŝi preskaŭ tute ne eliradis de ŝia ĉambro.

DUA PROBLEMO (10 poentoj) :

Vorto-ĉeno

Eltrovu la 27 vortojn, kiuj formas ĉenon tiel, ke ĉiu vorto komenciĝas per la meza silabo de la antaŭa vorto. Ĉiuj serĉotaj vortoj konsistas el tri duliteraj silaboj, do el ses literoj. Jen la signifoj de la vortoj :

1. Mezazia lando. — 2. Markolora juvelŝtono. — 3. Malakcepti. — 4. Stilzbirdo. — 5. Senpieda besteto. — 6. Dipatrino. — 7. Amerika mono. — 8. Konifera arbo. — 9. Stulte rideti. — 10. Dometaĉo. — 11. Urbo kun fatala turego. — 12. Blankligna arbo. — 13. Antikva ĉemizo. — 14. Horizontala ebeneco. — 15. Ŝtofo kun haretoj. — 16. Granda insekto. — 17. Kotona teksaĵo. — 18. Enkorpa malsanaĵo. — 19. Imitenda objekto. — 20. Malbona spirito. — 21. Nigra birdo. — 22. Orientafrika regnestro. — 23. Hungara manĝaĵo. — 24. Flava kupro. — 25. Monta traboraĵo. — 26. Flugvetura malhelpo. — 27. Vendejo.

AMUZAJ PROBLEMOJ

(apartaj de la konkurso)

Solvo de la antaŭa problemo

KRUCVORTOJ

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
I	K	A	O	S	■	E	T	A	P
II	I	S	K	I	A	T	I	K	O
III	E	T	■	A	R	A	■	R	E
IV	S	E	M	■	O	■	R	O	T
V	■	R	O	Z	■	M	U	S	■
VI	M	I	T	■	I	■	U	T	A
VII	I	S	■	I	L	E	■	I	G
VIII	E	K	O	N	O	M	I	K	O
IX	N	O	D	O	■	A	S	O	J

Nova problemo

EKZAMENO

Por ekzamini la historiajn konojn de la legantoj de Kulturaj Kajeroj ni citas ĉi tie dek famajn dirojn de historiaj personoj el diversaj landoj kaj tempoj. La tasko estas : nomi la personojn, kiuj diris la sekvantajn vortojn :

1. Nenio nova estas sub la suno.
2. La kubo estas ĵetita !
3. Parizo valoras unu meson !
4. Ne tuŝu miajn cirklojn !
5. La potenco iras antaŭ la rajto !
6. Serĉu la virinon !
7. Lasu la infanojn veni al mi !
8. Hontiĝu tiu, kiu pensas malbonon.
9. Ameriko apartenas al la amerikanoj.
10. Tiom da bruo pro unu omleto !

GRAMATIKO PER BONHUMORO

Elizio de O-finaîo

1) en poezio
— de l'ter' al ĉiel' ĝi laŭte krias ! (Z)

RIM :
— bel ' estas belo (ne bela) kur ' estas kuro (ne kuri)
— por eviti konfuzon ni atentu akcenti la lastan silabon
(ĝi estas tiu de la tuta vorto)
ĉiel' (ĉielo) — ĝiel (adverbo).

2) en kunmetita vorto
— banĉambro (por bano) = banoĉambro
— herbriĉa (je herbo) = herboriĉa
— kursportejo (por kuro) = kuro-sportejo
varmenergio = varmoenergio (energio de varmo)



Servo-kondiĉoj :


Matene mia ellitiĝo-horo estas la naŭa. Mimem elektas miajn maten-tag-kaj-vesper-manĝojn. Posttagmeze mi nepre bezonas 2 ripozhorojn. Vespere estas rekomendite al mi promeni kaj viziti spektaklojn por riĉigi miajn sentokapablojn.

Post unu prov-semajno, mi diros al vi ĉu mi konsentas iĝi via mastrino-helpantino.



Printempo :

Burĝonoj kaj ovoj en nestoj hezitas : « ankaŭ ni ŝatus eloviĝi por ĝui la unuajn promesplenajn sunradiojn. Sed kiu estas tiu diknazulo, kiu tiel forte ronkas ? »



Rezulto - Kialo :

— Jam de kelka tempo, viaj lerno-rezultatoj estas multe pli bonaj !

— Kompreneble Sinjoro Instruisto, nia televidaparato paneas jam de 3 semajnoj.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (45 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (85 fr.).

Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127, Midford Rd, Combe Down, BATH BA2 5Rx (15 ŝil.).

Ĉeĥoslovakio : S-ro Dezidero Koronczi, Nabrezie Metoda 1707/16, PRIEDVIDZA (2 us. dol).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE.

Finnlando : S-ro Joel Vilkki, SOMERO 9 - Pĉk. : Tu 60253 (9 mk.).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 234-759 (6,2 mk.).

Hispanujo : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1°, la, BARCELONO (110 pes.).

Italujo : Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (1.000 lir.).

Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (640 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (1520 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (7 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN.

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO.

Rumanio : S-ro Adrian Boldan, p.k. 1412, BUKUREŜTI - 6. (27 lei).

Sovetunio : S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 233 Rostov Don — 7.

Svedujo : S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk 157007 (10 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE.

Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (2 us. dol.).

Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (2 dol.).

Aliaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anonciatajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier Le Gérant : P. BABIN.

Supplément au n° 2 de 1972, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Vous trouverez à la page suivante le compte rendu de l'Assemblée générale qui s'est tenue à Grésillon le 19 mars. Les différentes résolutions montrent, cette année encore, une petite augmentation du nombre des sociétaires, mais aussi une diminution du capital. Ceci est dû au fait qu'un ami avait eu la gentillesse de prendre un nombre assez considérable de parts d'actionnaire pour nous aider financièrement, à condition, bien entendu, que cette somme importante lui soit remboursée selon l'article 9 des statuts, en cinq ans. Le nombre de parts remboursées est donc pour l'instant un peu supérieur à celui des nouvelles parts souscrites.

De nouveaux travaux de réfection et de transformation de chambres sont en cours. Nous en envisageons d'autres. En particulier la transformation d'une partie des communs en salle de conférence et de spectacle. La nécessité d'une telle salle se fait sentir à chaque stage. Elle permettrait d'avoir une installation stable et de libérer le salon et la bibliothèque pour ceux que n'intéresse pas telle ou telle conférence. Ce sera une dépense importante. Il est probable que, sauf aide extérieure, les travaux devront être faits en deux ou trois étapes, afin d'éviter d'arrêter totalement les aménagements prévus dans le château lui-même.

Tout cela sera possible avec l'aide de tous, et en particulier par votre participation à l'un de nos stages d'été. Bien que les inscriptions soient déjà assez nombreuses, il reste encore des places. En particulier, ceux d'entre vous qui préfèrent un programme allégé, qui pensent également au repos dans un cadre agréable, trouveront tout cela pendant la quatrième période, du 27 août au 10 septembre.

Nous attendons vos inscriptions, rapides et nombreuses.

P. BABIN.

ASSOCIATION CULTURELLE DU CHATEAU DE GRESILLON

L'Association créée fin 1971 a pris un bon départ. Déjà 100 personnes ont adhéré.

L'appel lancé pour la réalisation à Grésillon, par la M.C.E., d'une salle de conférence commence à donner des résultats. Au 18 mars, 780 F. avaient déjà été collectés. Nous sommes encore loin du but, mais nous espérons fermement que notre appel sera entendu.

Nous rappelons que cotisations (5 F.) et fonds pour la réalisation de la salle de conférence, sont à adresser à :

Association Culturelle du Château de Grésillon
C.C.P. : 25 12 77 Nantes
Trésorier : COUSSÉ Maurice
11, rue Alain-de-Rougé, 72 - Sablé

NOS PEINES

A la fin de février est décédée Mme Armand Puffeney, mère de M. et Mme Guillot, d'Annemasse, et grand-mère de Jean-Paul et Janette Guillot. Que nos amis trouvent ici l'expression de nos condoléances.

En mars, nous avons appris le décès de M. Pierre Lavallée, mari de Madame Lavallée, du Havre, bien connue des habitués de Grésillon. A Madame Lavallée va toute notre sympathie.

NOS JOIES

Robert et Marie-Thérèse Lloancy nous font part de la naissance de leur fille Marina. Bien cordiales félicitations à Mitou et Robert et tous nos vœux à Marina.

LA REVUE

Les abonnements nous sont arrivés nombreux. Quelques amis se sont étonnés que la bande de la dernière revue portait un rappel pour abonnement 71 non payé alors qu'ils avaient fait leur versement. Cela est dû au fait que leur réglement n'avait encore pas été enregistré lors de l'envoi de la copie à l'imprimeur car ils n'avaient payé qu'en janvier ou février. Qu'ils se tranquillisent. Tout est rentré dans l'ordre. Merci à tous.

ABONNEMENTS BIENFAITEURS
(suite)

M. Debertonne (78)	15,00
M. Buerick (62)	15,00
Mme Villette (49)	30,00
M. Chatelain (14)	15,00
M. Lanz (93)	15,00
Mme Bourgeois (Suisse)	20,00
Mme Chagnoux (03)	15,00
M. Curnelle (59)	15,00
M. Eyssautier (69)	15,00
M. Hervouet (92)	15,00
Mme Quillaud (44)	15,00
Mme Lucas (76)	15,00
M. Fabry (31)	15,00
M. Tailpied (14)	15,00
M. Habermehl (67)	15,00
Mlle Minault (79)	15,00
M. Rohrbach (Suisse)	15,00
M. Le Marquand (22)	15,00
Mlle Blanc (58)	15,00
Mme Claitte (69)	15,00
M. F. Jelenc (86)	15,00
M. P. Jelenc (U.S.A.)	15,00
M. Ligot (22)	15,00
Sro Gucz (Pologne)	15,00
Mlle Laporte (25)	15,00
M. Dumarquez (62)	15,00
M. Epstein (39)	20,00
M. Berret (13)	15,00
Mme Dupont (31)	20,00
M. Marbœuf (49)	15,00
Mlle Benoit (38)	50,00
M. Fresneau (35)	15,00
M. Martin (35)	15,00
M. Comadran (04)	15,00
M. Thirriat (75)	15,00
M. Bracquemont (63)	15,00
Mlle Hedelin (75)	15,00
M. Gallet (38)	15,00
M. Bouquin (59)	15,00
M. Juchault (17)	15,00
Mlle Chaillou (17)	15,00
M. Cellier (42)	15,00
Mlle Sol (33)	15,00
Mlle Texier (44)	15,00
M. Bossard (44)	15,00
Mlle Chatelus (69)	15,00
M. Bellon (06)	15,00
Mlle Villanova (13)	20,00
M. Beau (13)	15,00
M. Batailler (13)	15,00
Mlle Bonafous (13)	15,00
M. Carlue (13)	15,00
M. Jullien (13)	15,00
M. Santamaria (13)	15,00
Foyer d'Aix (13)	15,00
M. Lemenorel (13)	15,00
M. Quillaud (76)	15,00
Mme Rival (45)	15,00
M. Igigabel (53)	15,00
M. Lévêque (06)	15,00
Mme Caniot (79)	15,00
M. Chevalier (44)	15,00
M. Decobert (59)	15,00
Sro Steendahl (Danemark)	15,00
M. Herbert (62)	120,00
M. Henaux (92)	20,00
M. Beliard (44)	15,00
M. Benazet (66)	15,00
Sro Futran (U.S.A.)	15,00
Mlle Vinatier (44)	15,00
M. Ciret (49)	15,00
Laga Stelo (13)	15,00
Mlle Dardarin (79)	15,00
M. Diard (49)	15,00
M. Bergerot (88)	30,00
M. Goude (49)	15,00
Mme Cantel (17)	15,00
M. Pallard (72)	15,00
M. Ressort (13)	15,00
M. Llorens (26)	15,00
Mme Chaumereuil (Madagascar)	15,00
Sro Schagen (Pays-Bas)	15,00
Sro Dimitrov (Bulgarie)	15,00
Mlle Clavier (69)	15,00
Mme Valantin (18)	15,00
M. Lesoin (59)	15,00
Sro Zagorcin (Bulgarie)	15,00
Sro Mee (Grande-Bretagne)	15,00
Total	**1.515,00**

Assemblée Générale du Dimanche 19 Mars 1972

L'Assemblée générale s'est réunie, le 19 mars 1972, à 10 heures. La liste des membres présents et représentés a été dressée par le Président Babin. Elle comporte 204 actionnaires correspondant à un capital de 43.100,00 Fr. Le quorum est largement dépassé et l'Assemblée générale peut valablement délibérer.

Excusés : Mlles Vazon, Levrard ; Mme Thierry ; MM. Bénazet, Guillaume.

M. Coussé fait remarquer que depuis 20 ans de nombreux actionnaires sont décédés. Les sommes correspondantes aux actions de ces titulaires décédés seront regroupées dans un chapitre spécial, restant à la disposition des héritiers quand il sera possible de les contacter.

RAPPORT FINANCIER

Il est présenté par le trésorier, M. Coussé. M. Babin commente le compte d'exploitation au 31-12-1971 :

Recettes : Le stock est à peu près le même que celui de l'an passé. Les dons sont en augmentation de 2.300,00 francs, certains prêts ayant été transformés en dons.

L'augmentation de la rubrique séjour s'explique par une affluence plus grande au cours de l'été passé. Par contre il faut noter une légère diminution de la rubrique librairie, certains livres ayant manqué en fin de saison.

L'augmentation du chapitre excursion s'explique par le nombre plus grand de participants.

Dépenses : L'augmentation des différentes rubriques s'explique par un plus grand nombre de stagiaires (alimentation, blanchissage, salaires, charges sociales). Par contre la consommation d'électricité a légèrement diminué étant donné l'absence du couple de gardiens permanents. Le chapitre reversements séjours s'explique par le remboursement de séjours payés d'avance puis écourtés et des frais d'hôtel pendant le post-congrès de S.A.T. Les intérêts versés sont plus importants étant donné que la somme globale des prêts a augmenté.

BILAN AU 31 DECEMBRE 1971

Les disponibilités sont légèrement supérieures à celles de 1970. La répartition est très différente car il a été décidé de déposer 15.000,00 F. à la Caisse d'Epargne.

Les commissaires aux comptes ont contrôlé la régularité des opérations financières de l'année 1971 et donnent quitus au trésorier. L'Assemblée générale approuve le compte d'exploitation et le bilan.

Elle examine ensuite et approuve le rapport d'activité présenté par le Président, les membres du Conseil d'administration et les Conseillers techniques, à l'unanimité moins une voix contre, celle de Mlle Jeanne Dedieu.

MM. Cheverry, Berthelot et Prévot sont désignés commissaires aux comptes pour l'année prochaine.

Les membres sortants du Conseil d'administration et Conseil technique sont réélus à l'unanimité : Mmes Micard, Mathé ; MM. Bodereau, Dairon, Guillaume, Jelenc.

L'Assemblée générale enregistre la démission, pour raison de santé, de Mlle Levrard, de son poste de conseiller technique. Mme Prévot est élue pour la remplacer. M. Lemagadur est également élu conseiller technique.

L'Assemblée générale enregistre le départ d'un sociétaire et l'inscription de neuf nouveaux, portant le nombre des actionnaires à 346 pour un capital social de 72.809,43 francs.

MISE AU POINT DES STAGES DE 1972

Pâques (1re période) : Cours donnés par M. Ribot. Il y a déjà 25 inscriptions.

Semaine Culturelle : 70 inscriptions dont 40 jeunes. **Passages** prévus pour le mois de juin.

Eté : 2 au 23 juillet. — Il y a déjà 35 inscriptions. Les cheminots espérantistes viendront 15 jours. Une rencontre d'enfants est prévue pendant ce séjour avec enseignement de l'Esperanto, par jeux et distractions diverses sans cours systématiques. Administration assurée par M. et Mme Babin. Les cours seront assurés par M. Thierry et M. Babin. Dominique Babin conduira le cours 1er degré. Activités annexes : vannerie, émaux.

23 juillet au 6 août. — 20e anniversaire de Grésillon. Des invitations ont été lancées à 31 groupements internationaux ; Il n'y a actuellement que 10 réponses, dont 7 positives. Il y a déjà 30 inscriptions, dont une forte participation d'Allemands. L'administration sera assurée par M. et Mme Guillot.

6 au 27 août. — Le président a déjà reçu 40 inscriptions. Le cours 1er degré sera assuré par Evelyne Lemagadur, le 2e par M. Lemagadur, le 3e par M. Ribot. Dans le cadre des activités annexes la reliure sera assurée par Mme Mathé, la vannerie par Mlle Turbillon, la photo par M. et Mme Leriche. Le moniteur pour les émaux n'est pas encore désigné. L'administration sera assurée par M. et Mme Dairon.

Septembre. — Il n'y a pas encore d'inscriptions mais elles sont habituellement très tardives. L'administration sera assurée par M. et Mme Ciret.

Pour marquer le 20e anniversaire, au cours de chaque séjour une journée sera organisée en évoquant l'histoire de la Maison Culturelle.

AFFAIRES DIVERSES

Travaux déjà réalisés. — La 2e tranche de travaux concernant l'évacuation des eaux usées a été exécutée cette année. Le coût est de 3.000 F. environ.

A la suite de la tempête, un acacia a dû être abattu, devant les communs.

Travaux à effectuer : Il faudra réaliser la réfection du conduit d'évacuation de la cheminée du salon.

Travaux en cours. — Quelques chambres sont en rénovation. Des plafonds ont dû être refaits et l'installation électrique adaptée au nouvel aménagement de certaines chambres. Certains mobiliers ont été modernisés.

Des infiltrations d'eau dans les douches du 1er étage ont nécessité la réfection d'une cloison.

Le chauffage central dont l'accélérateur donne des signes de défaillance devra subir des réparations.

L'eau potable très ferrugineuse a usé le filtre du réservoir qui devra être changé.

Les terrains situés à droite de l'allée d'entrée du château ont changé de propriétaire récemment. Le Président regrette de ne pas avoir été informé du projet de vente car l'acquisition des terrains par la Maison aurait été souhaitable.

M. Coussé donne quelques informations concernant l'Association Culturelle du Château de Grésillon, créée en octobre 1971. Son but est de venir en aide à la Maison culturelle. Elle se propose de financer une première tranche de travaux d'aménagement d'une grande salle de réunion. Le devis de maçonnerie est de 7.000 F. environ. Il en faudra sans doute au moins autant pour que l'aménagement complet soit réalisé.

Certaines suggestions ont été présentées par écrit au Président, émanant de membres n'ayant pas pu assister à l'Assemblée générale.

Il est proposé que U.F.E. construise une salle de Congrès à Grésillon en association avec la Maison Culturelle. Cette suggestion n'est pas jugée réaliste par l'Assemblée générale.

D'autre part, il est demandé que le nom de tous les responsables de stages soient publiés avec les premiers programmes. M. Babin indique qu'il n'est pas possible d'établir le programme avec certitude un an à l'avance

et que les premières inscriptions arrivent dès le mois de novembre ou même plus tôt.

Il est également demandé que les horaires des transports soient envoyés aux futurs participants aux stages. Le Président répond que la Maison Culturelle n'a pas les moyens d'une agence de voyages mais chaque fois que c'est possible, des renseignements assez complets sont envoyés, en particulier aux étrangers. Cependant les changements d'horaires au mois de mai compliquent beaucoup sa tâche.

Il est souhaité aussi qu'une affiche indique pendant les stages le nom et le numéro de chambre du responsable, quand le bureau est fermé de jour ou de nuit, pour établir rapidement un contact en cas d'urgence. Cette suggestion pourra facilement être satisfaite.

Enfin les membres présents à l'Assemblée générale se joignent au Président pour remercier un étranger très satisfait de son séjour au Château, qui désire garder l'anonymat et qui a fait un don de 2.445,04 Francs.

Après un rappel des différentes plantations qui ont été effectuées dans le parc, sous les indications de M. Métivier, la séance est levée à 17 heures.

REUNION DU CONSEIL D'ADMINISTRATION à l'issue de l'Assemblée générale

M. Coussé informe les membres du Conseil d''Administration qu'il désire abandonner son poste de trésorier. M. Chevallier est nommé pour le remplacer et Mme Prévot lui est adjointe pour l'aider dans sa tâche.

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ

de **P. Babin**

Prix : **8,50 F.**

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude

Vos dictionnaires

Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie.

Adresser commandes et chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
49 - Baugé
C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de **5 Fr.**

Demandez notre catalogue.

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 30,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon : noires :	0,40 F.
couleur :	0,50 F.
Cuillères de collection : 9,00 et	12,00 F.
Pendentifs :	7,00 F.
Disques de stationnement :	3,00 F.
Etoiles pour vitres de voitures :	1,00 F.
Disque 30 cm avec chansons de Bob Dylan interprétées par le Duo Espera :	28,00 F.

et :

Les Héros Existentialistes

(texte français-esperanto)

de Colette Llech-Walter : 3,00 F.

(plus frais d'envoi pour commande au-dessous de 5,00 F.).